w

# KOMITATO-KUNSIDO

4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris - Métro Bastille

## sabaton la 15an de majo 2021

---

### 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Sabaton la 15an de majo 2021, de la 14a30 ĝis la 17a1 , kunsidis rete la Komitato de Espéranto-France [ĉeestas: S = fizike en la sidejo, R = rete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Michèle | ABADA-SIMON | MAS | Repr. de la membraro | R | | | |
| Alex | ANDRÉ | AA | Repr. de la membraro | R | | | |
| Véronique | BICHON | VB | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bernard | CORNEVIN | BC | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Vincent | JACQUES | VJ | Repr. de la membraro | | | x | |
| Maurice | JUY | MJ | Repr. de la membraro | R | | | |
| Alex | KADAR | AK | Repr. de la membraro | R | | | |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | R | | | |
| Christine | RAIFFAUD | CR | Repr. de la membraro | R | | | |
| Emmanuelle | RICHARD | ER | Repr. de la membraro | R | | | |
| Axel | ROUSSEAU | AR | Repr. de la membraro | R | | | |
| Eric | STREICHEMBERGER | ES | Repr. de la membraro | | x | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de la membraro | R | | | |
| Paul | QUEVY-LEFEVRE | PQL | Repr. de la membraro | R | | | |
| Gilbert | STAMMBACH | GS | Repr. de fed. France-Est | | | | |
| Marc | GIRAUD | MG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Florian | CEZARD | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | | | x | |
| Clair | MAHÉ | CM | Repr. de fed. Limousin | R | | | |
| Michel | DECHY | MD | Repr. de fed. Nord | R | | | |
| Laurent | PEUCH | LP | Repr. de fed. Bretagne | R | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Pascal | VILAIN anst. Thierry SPANJAARD | PV | Repr. de fed. Provence | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| Bertrand | SAJUS | BS | Repr. de FKEA | | | x | |
| Elisabeth | LE DRU | ELD | Repr. de GEE / ĬLEĬ-Francio | R | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | x | |
| Clément | BALEYTE | CB | Repr. de JEFO | | | x | |

20 komitatanoj ĉeestas el 27.

### 0.2 Elekto de prezidanto kaj protokolanto 1 min @ 14:36

BF prezidas. ER kaj AA protokolas. Helpas ilin JLM kaj AR.

### 0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj 5 min @ 14:37

–

### 0.4 Dato de la venonta kunsido 5 min @ 14:45

Dimanĉon la 10an de oktobro en PArizo ekde la 9a30 ĝis la 16a. Povus okazi laborgrupoj sabaton posttagmeze.
**ELEKTO: jes: 15 - sindetenas: 5**

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1 Elekto de la Estraro ELEKTO @15:45

BF prezentas la nuntempajn membrojn de la Estraro: ER, JLM, AA, XG, MJ kaj BF.
Axel ROUSSEAU pretas eniri la teamon.
Ankaŭ Christine RAİFFAUD.
Paul QUEVY pretas helpi la kasiston pro siaj spertoj en banko-posteno.

**ELEKTO: Jes: 19**

### 1.2 Nova aliĝilo 2021–2022 DISKUTO10 min

JLM memoras ke por impostatestilo necesas pago 1) je la nomo de la membro kaj 2) antaŭ la 31a de decembro.
Gravas ke la pago okazu la saman tagon (aŭ monaton por ĉeko) kiel la aliĝo kaj ne eblas uzi monon sur la arthur-konto (kiu estas eble pagita antaŭ pluraj jaroj). Se restas kredito en la arthur-konto, prefereble oni petu repagon al sia konto kaj tuj poste pagu la aliĝon.

### 1.3 Buĝeto, strategio kaj laborplano de la nova komitato DISKUTO 55 min @ 15:02

https://esperanto-france.org/finances/2020

Temas pri buĝeto *sen eksterordinaraĵoj enspezoj*. Ĉar, kvankam la eksterordinaraĵoj ŝajnus ordinaraĵoj pro, unu po du jaroj… ni ne devus konsideri ilin por prepari sanan (kaj minimuman) buĝeton, eble uzante monon el la rezervoj sed planante tion.

Mezume de la 3 lastaj jaroj: enspezoj ~78k€, elspezoj ~93k€ : estus deficito por 14k€.
Konsiderante ke Espéranto France havas ~100k€ je la 30/09/2020, se sekvus jaro post jaro tioma deficito de 14k€ restus (sen la eksterordinaraĵojn kompreneble) neniom en nur 7 jaroj.
Kutimaj enspezoj: kotizoj, vendoj (libroj per la butiko ktp), donacoj, ktp. Restus ~26k€ disponeblaj por EF.
Kutimaj elspezoj: sidejo ~20k€, salajro ~20k€, komunikado ~5k€, subvencio ~1k€. Elspezus ~50k€.
Notinda: dank'al la "Réduction de charges patronales", ekde 2003, nia dunganto-kosto vere ne estas alta.

La Komisiono Financo bonvenas al ĉiuj kiuj volas partopreni kaj proponi ideojn por finfine ekvilibrigi la buĝeton. Pluraj vojoj ekzistas, eblas. Ekz, bezonus ~800 novajn membrojn por ekvilibrigi pere de kotizoj. Ekz, pli luadigi la sidejon, komunan dungiton kun SAT-amikaro, malpli da kuriero, …
La komisiono pri financoj pristudu la aferon por proponi solvojn.

## 1.4 Subvencipeto de KoToPo DECIDO 50 min @ 15:57

BF resumas la ekonomian historion de KoToPo kaj la nuntempan peton. La temon traktis hieraŭ la komitato. Jen proponoj el hieraŭ:

**Propono 1** : respondi pozitive la demandon de KoToPo, nuligi la ŝuldon kaj donaci 8200 €

**Propono 2** : respondi pozitive la demandon de KoToPo, nuligi la ŝuldon kaj alvoki por donacoj ene de nia membraro kaj duobligi la donacojn ricevotajn okaze de la donacalvoko de KoToPo al sia membraro ĝis la maksimumo je 5000 €
La kondicôj estus subskribo de kontrakto kun KoToPo por:

- ricevi detalan financan planon pri la restarigo de sanaj financoj
- ricevi regulajn informojn pri la agado de KoToPo por publikigo en nia revuo kaj retbulteno
- havi eblecon organizi kunsidojn aŭ seminariojn en la loko kun preferaj kondiĉoj

**Propono 3** : respondi pozitive la demandon de KoToPo, nuligi la ŝuldon kaj alvoki por donacoj ene de nia membraro kaj duobligi la donacojn ricevotajn okaze de la donacalvoko de KoToPo al sia membraro ĝis la maksimumo je 5000 €
La kondicôj estus subskribo de kontrakto kun KoToPo por:

- ***havi sidlokon en la komitato de KoToPo***
- ricevi detalan financan planon pri la restarigo de sanaj financoj
- ricevi regulajn informojn pri la agado de KoToPo por publikigo en nia revuo kaj retbulteno
- havi eblecon organizi kunsidojn aŭ seminariojn en la loko kun preferaj kondiĉoj

**Propono 4** : respondi negative la demandon de KoToPo

**ELEKTO**
propono 1: 0
propono 2: 6
propono 3: 8
propono 4: 4
sindetenas: 1

## 1.5 Dungo de Saïd nome de UEA INFORMO 2 min @ 16:46

UEA devas dungi iun en Parizo, kaj Espéranto-France zorgos pri tio kaj UEA repagos la salajron al EF + etan kompenson.

## 1.6 Enkonduko de reta voĉdonado DECIDO 5 min @ 16:49

AK opinias ke pro Kovim-19 homoj pli kaj pli uzas İnterreton. La vojo estas duone atingita por Espéranto-France: nur mankas la ebleco rete voĉdoni aŭ baloti, kaj tiel ŝpari monon: ni nur sendus paperpôste al homoj kiuj ne havas retan aliron.

## 2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

/

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo…)

### 3.1 Projekto: Eldoni libron de Laure Patas d'İlliers — DECIDO 13 min @ 16:54

Plene verkita originale en Esperanto, provlegata de FLJ. Eldonenda kiel bitlibro kaj laŭmenda presado?
Laure jam ricevis verko-premion de UEA, la diskutoj inter ŝi kaj ni estas fruktodona, ekz. ankaŭ pri kovriloj kaj varbado al Esperantistaro.
Esperanto-France planas realigi eldonan kontrakton kun ŝi: unuafoje por ni kun aŭtoro.

ELEKTO: ĉiuj konsentas

### 3.2 Projekto Péraire — INFORMO 2 min@ 17:07

CNRS deziras ciferigi la dokumentojn de Lucien PÉRAİRE en la kelo de la sidejo.

### 3.3 Kongreso 2022 — INFORMO 2 min@ 17:08

La kongreso planita en Trélissac (apud Périgueux) por 2021 okazos en la sama loko de la 26a ĝis la 29a de majo 2022.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

/